**La bezono por familioj diskuti historion -** Michael Wade - Satkongresso 2014

Mia nomo estas Mike Wade kaj mi estis en lernejo en Hastings cxe la suda marbordo de anglujo dum la 1950'aj(mil naucent kvindekaj) jaroj. Gxi estis internacia pensiona lernejo kun gelernantoj el multaj landoj. Tiu inkluzivis multajn regionojn de la Brita imperio. Ni havis lernantojn el Malajlando, Cejlono, Irako, Kuvajto, Cipro, Irano, Skotlando, Belgio, Usono kaj Britio. Kiam la lernejo venis al Hastings dum 1951, la Brita registaro havis grandan malkonsenton kun Irano pri la petrola industrio. Malgraux iu situacio, la cxefinstruistino kiu kredis, ke ni havos pli grandan profiton kiam ni ricevas internacian edukadon kune, ankaux invitis kaj ricevis infanojn de Iranaj familioj, kiuj inkluzivis knabinojn. Cxi tio donis al ni, en la logxkomunumo, la sxancon por unika kaj progresema sperto en internacia eduka medio. Estantaj infanoj, tio ebligis nin babili kaj kompari niajn spertojn en niaj malsamaj familiaj kaj sociaj medioj. Tio okazis cxar en iom da situacioj, familioj suferis multe pri politikaj agadoj dum tiu tempo. En 1958 la gepatroj de du knaboj el Irako devis fugxi la domon kaj laboron tie pro revolucio. Dume cxiuj britaj civitanoj devis foriri Irakon pro la dangxero. Estantaj infanoj ni jam spertis en iuj familiaj la malbonajn efikojn de monda politiko. Malgraux tio, pli kaj pli da gepatroj deziris, ke iliaj infanoj cxe estu la lernejon. Se ni havu internaciajn spertojn aliloke ekstere, la cxefinstruistino inklusivis ilin en nia edukado. Sxi auxskultis min, kiam mi rakontis pri mia venonta kampvojagxo en Jugoslavio dum la ferio. Tiam sxi diris al mi, " do vi skribos por mi eseon pri via kampvojagxo en Jugoslavio por via feriolaboro!" Kiam mi alvenis hejmen miaj gepatroj certigis, ke mi skribis gxin dum la ferio, kaj ankaux kiam mi revenis al lernejo, ke mi donu gxin al la cxefinstruistino. Kiam la lernejo grandigxis, ni lernis novajn fakojn kaj mi partoprenis en la unua latina klaso kiun

ili instruis. Ni havis neordinaran sperton dum la lasta latina leciono dum la unua trimestro. La cxefinstruistino faris ion en la klascxambro, kiu indikis al ni, ke nia latina instruisto ne dauxros instrui nin. Je la sekvanta trimestro ni havis novan instruistinon por la latina kaj la franca lingvoj. Pro tio ke la cxefinstruistino estis instruistino de antaux la milito, sxi sciis pri Esperanto, do sxi sciis ke gxi estas la lingvo kiun ni bezonus lerni, por bone pretigi nin por la internacia mondo kiun ni jam spertis kune. Pro tio, ke mi ne havis bonan sukseson kun la latina kaj la franca lingvoj, sxia protesto influis min sercxi por detaloj pri la historio de Esperanto, kaj poste eklerni gxin. Pri aliaj partoj de la oficiala edukinstruplano, la cxefinstruistino ankaux malkonsentis. Ekzemple, en Britio ni havis novan kurson en 1952, kiu nomigxis "Gxeneralaj Studoj", kiun oficiale la Britaj lernejoj devus instrui al lernantoj kiam ili havis 16 jarojn. Sed nia cxefinstruistino ekinstruis Gxeneralajn Studojn al ni kiam ni havis dek jarojn, cxar sxiaj lernantoj finus ce la lernejo antaue ili havus 16 jarojn.  Sxi kredis, ke ni bezonas lerni kiel la mondo funkcias dum reala vivo, tuj kiam eblas.

Lernanta el Historio Hodiaux

Dum 2014 ni pensas pri okazo de nia historio, cxar nun ni havas la centjarigxon de la komenco de la Unua Mondmilito. Estas bona tempo diskuti la efikon de la historio iun ni lernis dum niaj vivoj kaj nia edukado. Sur la muro antaux ni en la Louis Guilloux salono, ni havas bildojn kun multaj interesaj detaloj el la unua mondmilito. Bedauxrinde, mi devas diri, ke dum historio en la lernejo en Anglujo, ni neniam lernis pri la informo kiun ni havas cxi tie, kiu estas necesa por pli bone kompreni historion kaj kion gxi signifas.  Cxi tio kauxzas min demandi kial tio okazis kaj kiu efiko gxi havas por ni kaj por nia kompreno de la mondo kaj gxiaj problemoj.

De kiam SAT ekfunkciis en 1921, levigxis la demando,"Cxu ni

plibonigas nian metodon por diskuti kaj solvi la problemojn de vivo, super la metodoj kiujn registaroj uzas por solvi mondproblemojn inter la landoj ?"  Cxi demando ekzistas kiam familioj vidis aliajn familiojn suferantajn, pro la metodoj kiujn registaroj uzas por solvi politikajn problemojn. Tio cxar tiuj metodoj ofte havas pli detruajn efektivojn. Ili ofte detruas familiojn kaj ankaux la komunuman bazon kiun ili bezonas por travivi, kaj do la familioj kaj iliaj infanoj suferas multe. Do tiuj ne estas bonaj metodoj, pro la efiko sur familioj, por uzi en la moderna mondo, kaj ni devas sercxi pli bonajn manierojn por venki tiajn problemojn.

Kiam familioj penas ekzameni cxi problemon, la granda malfacilajxo estas, ke la gepatroj de junaj infanoj ne havas la tempon havi longajn diskutojn pri tiu problemo. Sed la pli maljunaj membroj de familioj, la geavoj, kiuj kun tiaj spertoj de vivo havas pli grandan interesigxon por venki la problemon, ofte havas la tempon. Do ili povas havi diskutojn, dum la jaroj, kun iliaj infanoj kiuj estas la gepatroj kun infanoj. Iuj geavoj kiuj estas pensiuloj, estas ankaux membroj de la Universitato de la Tria Agxo - la U3A . Iuj de la geavoj jam uzas iliajn agadojn en la U3A por ekzameni naciajn historiojn el diversaj landoj, kiuj ofte donas malsamajn detalojn kaj versiojn pri la samaj okazajxoj en historio. Cxi tiuj malsamaj naciaj perceptoj povas kauxzi seriozajn internaciajn miskomprenojn pri venkordo de problemoj, cxar kiam ni nur audas pri niaj naciaj historioj, ni pli ofte ne komprenas pri internaciaj problemoj. Cxi tio haltas progreson pri kompreno, kaj do cxesas efektivan antauxeniron en internacia civilizacio per diskuto, necesa por venki internaciajn problemojn.

En grupo de la universitato de la tria agxo en suda anglujo, ni diskutas cxu eble familioj estas la grupoj kiuj devus diskuti kune la problemojn de vivo inter la populoj de la mondo. Ili

devus ankaux fari tion por subteni la diskutojn inter la registaroj de la mondo. Cxi aliro malfermas novajn eblecojn por progreso cxar familioj povas doni iliajn versiojn pri siaj spertoj de internaciaj eventoj. Iliaj spertoj ofte havas pli bonajn detalojn ol la naciaj versioj, kaj la familioj en malsamaj landoj ofte povas trovi multan komunon por interkonsento dum la registaroj malkonsentas. Do grava aliro por subteni progreson , estas ke ni devus permesi kaj subteni grupojn de familioj de malsamaj landoj diskuti problemojn de vivo. Tiam ili povas diskuti kaj sercxi kune por solvoj por la gravaj problemoj, kiu efikas cxe plej multaj el infanoj. Cxi tio estas la samaj malfacilaj problemoj kiujn la registaroj diskutas, kaj ia plua helpo por venki ilin donos subtenon por la oficialaj penoj de la registaroj por malgrandigi kaj venki tiajn problemojn.

Se ni deziras fari progreson, tiam por sukcesa komunikado inter familioj cxie, neuxtrala formo de  komunikado estas necesa por eviti malegalecojn dum la komunikado. Cxi malegalecoj okazas se unu persono devas uzi la lingvon de la alia, do malekvilibrigantan egalan aliron al la diskuto kaj reduktanta la sxancon de gxia sukseso. SAT jam scias, ke Esperanto estas la plej povplena kaj alirebla neuxtrala lingvo, kaj estas versxajne la sola praktika maniero por solvi cxi problemon. Eble per SAT, familiaj membroj de universitato de la tria agxo en francio kaj en aliaj landoj, post ekzameno de la problemo, havos interesigxon por diskuti la problemon kune. Sxajnas grave ekfari nun, kiam gepatroj en la tuta mondo pli maltrankvilias pri kiel provizi la plej bonan estonton por siaj infanoj, kaj sercxas por manieroj trakti pri cxi problemo. La respondeco por esplori kion ni povas fari por cxiuj infanoj estas kun ni, la familioj en la industria mondo. Tio cxar ni havas la plej bonan sxancon por fari progreson. Do ni devas havi proponojn kaj agadojn kiuj subtenos sukcesajn diskutojn por venki multajn problemojn,

kiuj alie, ni lasos por la sekvantaj generacioj por trakti.

Proponoj

Mi havas iajn proponojn por pripensi sed ni devas diskuti kiujn proponojn vi pensas ke ni devas fari por progreso.

Mi sugestas, ke familioj diskutu pri historio jam kiam infanoj lernas kaj diskutas en lernejoj kaj tio subtenos diskutojn en la hejmo kaj ankaux en internaciaj komunikadoj inter familioj pri historio. Edukado hejma  por infanoj ankaux donas subtenon. Por inkluzivi iliajn spertojn de historio, geavoj ankaux devas diskuti ilin por subteni la familiojn. La tuta temo de memedukado estas jam pli interese subtenata per SAT dum cxiuj la multaj kunvenoj de la SAT kongresoj. Do jen proponoj aldoni agadon per SAT.

Post konsiderinda diskuto la proponoj dum la kongreso en Dinano inkluzivis, ke ni devas fari tradukojn de specifaj preskribitaj eventoj en la historio el malsamaj landoj. Estis ankaux proponon ke ni pripensu organizi kunvenojn por plue diskuti rezultojn kaj diskuti kiel ni fari pluan progreson. Estas bonaj proponoj por progresigi kaj subteni internacian komprenon.